

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 24 – Julio – Aŭgusto – Septembro 1993

ISSN 0986 - 1181

Ĉefartikolo



Magia kompreno

"Trimastulo havas kvar velojn sur ĉiu masto. Ĉiu velo estas 15-kvadrat-metra. Ankaŭ notu, ke la velŝipo kuras po tri nodoj. Kioma estas la aĝo de la kapitano?"

Ĉiuj iam aŭdis tian aŭ similan ŝercproblemon. Ĝi manifestas tipan aliron al matematikoj, faritan el nekompreno antaŭ (ŝajne) kompleksa faktaro kaj el magia sinteno rilate al io nekomprenata. Sed simila magia sinteno ekzistas ankaŭ rilate al lingvo ĝenerale kaj eĉ rilate al la (tro) simpla Esperanto. Oni trovas magiulojn en ĉiuj fakoj.

Mi antaŭ ne longe legis artikolon en konata revuo, en kiu aŭtoro malracie diskutis pri la signifo de vortoj derivitaj per -ano. Ĉu ano povas signifi civitano, landano, loĝanto aŭ simile? La afero estas tamen simpla, sed "kial ĝin lasi simpla, se ĝi povas esti komplika?"

Ekzemple, Nederlando signifi nur ano de Nederlando. Estas nur rilato de aparteno inter individuo kaj difinita lando. Reciproke la lando Nederlando apartenas al siaj anoj, al la Nederlandanoj! Tiu aparteno ne estas leĝa, aŭ ajna, sed ja lingva aparteno: praktike ĝi estas iu "genitiva rilato". Kiel tia ĝi ne povas esprimi pli kompleksajn semantikajn rilatojn. La eraro konsistas trudi tiajn...

Same estas por Nepalo, Nepalanoj; Tibeto, Tibetanoj, ktp. La afero restas identa kun Germanoj kaj Germanio: la reciproka aparteno (la reciproka genitivo) plu ekzistas; Germanio estas la lando de Germanoj kaj Germanoj estas homoj de Germanio! Ekzistas sama dudirekta rilato inter Germanoj /Germanio kiel inter Nederlandanoj /Nederlando! Pro tio Germaniano estas nekonsilinda sinonimo de Germano).

Sed rediros iu magiulo "kiel nomi Turkon loĝantan en Germanio? Ĉu li ne estas Germaniano?" Tio ne estas tre konsilinda: la esprimo estas nek ĝeneraligebla nek klara! Se tiu Turko iras al Nederlando, vi ne povos uzi similan esprimon. Kaj plie se Armeno venos en Germanion, ĉu vi nomos lin same kiel la Turkon? Esperanto malŝatas esceptojn kaj malklaraĵojn! Vi simple diru Turko aŭ Armeno en Germanio aŭ en Nederlando. Pli klare, pli precize kaj sendube esprimita. Tio plie estas ĝeneraligebla!

Tio estas universalaj esprimmanieroj! La homo kuras kaj kruras sur la tuta planedo, explore, ekspedice, vojaĝe, turisme, konkere, kolonie, ktp kaj la registaroj, kiujn li starigas, inventas leĝojn kaj statusojn por siaj anoj. Ili demonstras la multfacetan spiriton de tiu estaĵo, la homo. Plie la homo apartenas al nur unu specio, li havas nur unu anatomion kaj nur unu fiziologion sur la tuta planedo. Li ĉie same naskiĝas kaj naskas aŭ naskigas. Oni estas naciato pro heredo, pro akiro, pro enlanda naskiĝo, pro mil kaj unu leĝoj... Tial ofte nur la koncernito kapablas esprimi la propran aktualan statuson.

La landnomoj devas respondi al la 15-a Regulo de la Fundamento. Ili estas internacie konataj kaj sufiĉe ofte, sed ne ĉiam, la enlanda nomo estas konforma al la internacieco. Ekzemple, Ukraino, nepre landnomo laŭ la etimologio, nepre respondas al la nomo en ĉiuj lingvoj, inkluzive la Ukrainan, dum Ukrainano nepre respondas al la derivaĵoj en ĉiuj lingvoj. Sed iuj obstine volas ignori la faktojn kaj la propran eraron; ili pretendas, ke "Ukranioj" povos nomi la Rusojn en Ukraino! Multaj alilingvanoj male komprenos tiun nomon, kiel la tradukon de ilialingva Ukrainano! Utilas al nenio inventi propran nomon ne konforma al la internacieco. Iuj magiuloj opinias solvi per gramatikaj rimedoj la esprimon de homaj leĝoj, kondutoj aŭ kutimoj. Tio estas nerealisma.

D-ro André ALBAULT

*) Rekomendoj pri landnomoj, § 3 (Novembro 1985) (Vd. Aktoj III, p. 49).

Kroniko de la nuntempo



”Kolekti ĝas pacaj batalantoj”

Jam de jardekoj en Esperantio de temp'al tempo ekfulmas akra humoro, kiel atestas la jena letero : *”Mi post forta kverelo kun anoj de Profesoro Ŝulco kaj leterinterŝanĝo kun Kultura Asocio . . . mi volas submeti al la Akademio de Esperanto konkretan demandon. Mi petas la Akademion respondi ĝin, ĉu per simpla aserto, ĉu per rekomendo kune kun klarigo. De klara kaj korekta respondo al tiu demando laŭ mi por la Esperanto-komunumo multo dependas.*

”Jen la demando : ĉu la vortoj novjaro, altmontaro, fojfoje, junamikoj kaj aliaj estas gramatike korektaj kaj uzeblaj en Esperanto?”

Kio estas la signifo de tiuj vortoj? Aŭ ĉu Rikardo Ŝulco pravas, se li asertas, ke oni ne rajtas uzi tiujn vortojn, aŭ ĉu mi pravas dirante, ke la aserto de Ŝulco baziĝas sur granda penseraro, kaj ke tiuj vortoj estas absolute korektaj? Mi petas la Akademion diskuti tiun ĉi demandon prioritare kaj respondi al mi persone kaj eventuale publike en la Letero de l' Akademio.”

Nu jen enkonduke ia prilumo de la punkto.

”Novjaro” formiĝis per prefiksigo de la adjektiva radiko ”nova” same, kiel ĉe Zamenhof ”novluno” kaj ”novmonato”; sed ĉar laŭ la vortigaj kutim-reguloj prefiksigo de tia radiko ne estas ĝusta, tial la radiko povas akiri specialan nuancon plej ofte kun senta koloro, kies senco respondus pli al ”jara denovo” ol al ”nova jaro” . . .

”Altmontaro” simile al la Zamenhofaj ”altlernejo” (supera lernejo), ”altforno”, ”altreliefo”, povas akiri apartan valoron laŭ ĉirkaŭteksto, alispecan ol ”alta montaro”, kiu restas pli banala kaj konkreta!

”Junamikoj” nepre ne estas ”junaj amikoj”, sed laŭ kunteksto povas esti ”amikoj de juno” (t.e. de la juneco, de la junaĝa tempo) same, kiel ”junedz(in)o”, kiu kvankam maljuna, estas konsiderebla juna sed nur laŭ la edz(in)iĝa vidpunkto.


Tiel la fenomeno de radik-prefiksigo evidentigas la vivantecon de la lingvo kaj la rigorismon de Rikardo Ŝulco, kiu verŝajne rezultas el tro matematikeca rezonado; sed la ekzisto de tia fenomeno nek ial nek iel povas pravigi ĝeneraligon tro sisteman, ĉar tiam perdiĝus ĝuste la aparta nuanco, kiu ĝin estigis. (Cetere pri tio en PAG § 423 & 424).

”Fojfoje” eliĝas el ripeta procedo tiel kutima en parolataj lingvoj por akcenti sporadecon : pli ĝusta formo tamen estas ”foje-foje” (PAG § 196. Ĝi neniel povas signifi ”iafoje”.

Jen, gesamideanoj, por certigi, ke *”Afabla vorto . . .*

pli atingas ol forto.”

J. T.



Rüdiger Eichholz

Baillieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0

Tel.: (705) 939-6088

Ĉiu kapablas kontribui ion al la evoluigo de nia lingvo

Fine de sia artikolo "Fakvortoj en ekonomio" (nr-o 23 de "La letero") d-ro Bormann prave pledis, ke Esperantistoj devas prizorgi sian fakan lingvaĵon. Ankaŭ en etnaj lingvoj taŭga faklingvo ne kreiĝas per si mem. Kompetentaj fakuloj devas konscie krei ĝin. En Kanado pli ol 100 lingvistoj dungitaj de la Kanada registaro jam dum deko da jaroj laboradas, por krei Francajn ekvivalentojn por la rapide evoluigantaj Anglaj fak-lingvoj. Tial povis aperi en ŝtata eldonejo amaso da modernaj fakvortaroj Francaj-Anglaj. Tio klare montras la gravecon, kiun Kanadaj gvidantoj atribuas al la evoluigo de la Franca, por ke tiu ĉi kapablu vivteni sin konkure kun la Angla.

Por evoluigi nian lingvon Esperantistoj disponigus eĉ ne milonon de la financaj rimedoj, kiujn la Kanada registaro oferadas. Ĉu ni pro tio rezignu krei niajn proprajn fak-lingvojn? Nepre ne! Nia lingvo kaj movado havas kvalitojn, kiujn la Franca ne posedas, kaj kiuj donas al mi la konvinkon, ke ni havas bonan ŝancon venki en la konkuro de lingvoj. Tio malgraŭ la aserto de multaj, ke la Angla jam estas taksenda kiel sola vere tutmonda interkomunikilo. Ni iom pli detale ekzameni la faktojn, kiuj laŭ mi kaŭzos la finan venkon de nia lingvo.

Esperantigo de Anglaj lingvaĵoj

Kontraste al la Franca nia lingvo havas kvalitojn, kiuj ebligas al ĝi senĝene absorbi internaciigintajn Angla-lingvajn terminojn. Dum en la Franca lingvo Anglaj lingvaĵoj tuj impresas kiel malbelaj fremdaĵoj, kiuj ĉe edukitaj Francoj instinkte vekas negativajn reagojn kaj igas Francojn postuli forigon de Anglaj vortoj el ilia lingvo, aliaj Eŭropanoj ankoraŭ ne ekkonis la dangeron por iliaj lingvoj. Ĉu estontaj Eŭropaj generacioj devos lerni la Anglan por povi korekte prononci en iliaj lingvoj tiujn fremdvortojn? Ju pli firma la pozicio de la Angla fariĝos en scienco kaj komunikado, des pli forta estos en la mondo la reago de edukitaj ne-Angla-lingvanoj kontraŭ la inundo de Anglaj fremdvortoj.

Feliĉe ni ne devas timi tiujn fremdvortojn en Esperanto. Certe ankaŭ multaj inter ni ne ŝatas la

proporcie tro grandan kvanton da vortoj devenantaj el la Angla. Sed dangeron por nia lingvo ili ne prezentas. La 15-a Regulo devigas nin transskribi fremdajn vortojn laŭskribe aŭ laŭsone tiel, ke ili ricevas la ortografion de nia lingvo. Kvankam "teamo" laŭskribe aspektas kiel Angla-lingva vorto, aŭdinto de parolata Esperanto ne divenus la originon de tiu ĉi vorto -- ĝi donas al li la impreson, ke iu deklaras sian amon al iu! Tial la uzo de "teamo" ne Anglaĉigas nian lingvon. Tiaj vortoj el la Angla ne ĝenas la parolatan lingvon, ĉar ni prononcas ilin Esperante. Kvankam nuntempe internaciigintaj terminoj kutime devenas el la Angla, tamen ni ne nepre devas transskribi ilin el tiu lingvo, ĉar Esperanto permesas ankaŭ aŭtonome krei Esperantajn terminojn. Sed tio estas aparte traktenda temo.

Aliaj avantaĝoj de nia lingvo estas ĝia simpla gramatiko kaj la libereco ĉerpi el iu ajn lingvo trafajn termino-elementojn, se ili ebligas al ni klare indiki la deziratan nocion. Ni ne povas pagi la eldonon de multaj fakvortaroj, tamen ni havas la avantaĝon profiti de etnolingve plenumitaj terminaraj laboroj per tio, ke ni al jam ekzistantaj multlingvaj terminaraj devas nur aldoni Esperantajn terminojn. Esperanto do povas profiti de la laboro, kiun la Kanada registaro pagis. Estas pli facile krei novajn Esperantajn terminojn, se terminoj por iliaj nocioj ekzistas jam en diversaj lingvoj. Tial nia situacio ne estas senespera.

Presitaj fakvortaroj ne plu necesas

Ankaŭ plifaciligado de elektronika registrado de terminaraj tekstoj plibonigas nian situacion. Modernaj programoj helpas al ni tre konvene klavi niajn tekstojn. Hodiaŭ ni ne plu devas zorgi pri eldonado de presitaj fakvortaroj, ĉar ni povas preskaŭ senkoste elektronike registri ilin. Tiujn terminarajn registraĵojn ĉiu komputoranto kapablas laŭbezzone multobligi. Elektronikaj tekstoj povas esti pli informriĉaj, pli aktualaj kaj pli konvene utiligeblaj ol presitaj verkoj. Pli kaj pli da Esperantistoj nun jam disponas pri propra komputoro, kaj certe ankoraŭ multe pli da ili akirus tiun aparaton, se ili sciis, kiel diversmaniere tiu mirakla maŝino povus utili al ili. Tamen nenormigitaj kodoj ellaboritaj de diverslandaj industriaj entreprenoj kaŭzas ankoraŭ problemojn je intersaĝo de dataoj. Sed tiuj nekongruaĵoj baldaŭ malaperos, post kiam programoj en Unikodo estos ĝenerale haveblaj. Unikodo provizas 16-bitajn kodaĵojn por ĉiuj literoj de ĉiuj lingvoj kaj eĉ por Ĉinaj ideografajoj.

Falos nun la teknikaj baroj inter Teranoj, kiuj malhelpis liberan penso-interŝanĝon. Tio aŭguras novan epokon. Tamen la lingvaj baroj ne estos tiel rapide venkeblaj. Por fariĝi egalrajtaj homoj ni bezonas komunan lingvon, per kiu ni kapablas interkomunikigi pri temoj el ĉiuj scio-kampoj. Tion ni pere de Esperanto ankoraŭ ne povas fari, ĉar por granda amaso da nocioj ankoraŭ mankas al ni vortoj. Sed multaj el ili mankas ankaŭ en etnaj lingvoj kaj eĉ en la Angla. Nun la tekniko donas al ni la eblecon komune krei tiujn terminojn kaj eljeti nebezonatajn homonimojn. Por ke tio povu okazi efike, ni interkonsentu pri jena procedo:

Ĉiu, kiu rimarkas mankon de Esperanta termino, klopodu difini ties nocion. Ĉiu notu la difinon kaj aldonu se eble etnolingvajn terminojn por la nocio. Por ke tiu okazu unuece en facile komparebla maniero mi ellaboris dum ok jaroj la Pekoteko-sistemon, kiun mi ŝanĝis en kelkaj detaloj, sed kiu ĝenerale restis stabila. Elektronikajn registraĵojn faritajn laŭ tiu skemo ni facile povas kompari kaj traserĉi. Ĉiu rajtas proponi Esperantajn terminojn por forigi renkontitan mankon. Ĉiu, al kiu la propono plaĉas, uzu ĝin ĝis iu kapablis elpensi pli trafan terminon. Tiu ĉi prezentu siajn argumentojn. Neniu estu devigata ŝanĝi sian lingvo-uzon. Mi ne timas, ke sinonima vort-uzo povus kaŭzi displitigon de nia lingvo, ĉar ĉiuj Esperantistoj deziras esti komprenataj. Eble kelkaj adoleskoj ŝatus krei apartan lingvon por si mem. Ni ne kontraŭu tion. Ili maturiĝos kaj deziros komunikadi kun ĉiuj homoj. Do ankaŭ ili alkiutiĝos uzi la saman lingvon, kiel ĉiuj plen-kreskuloj. La saman fenomenon ni povas observi en etnaj lingvoj.

Ni ne devas timi, ke Esperanto ricevos tiom da novaj radikoj, ke la lingvo fariĝos tro malfacile lernebla. Ankaŭ en etnaj lingvoj neniu konas la signifojn de ĉiuj vortoj. Tamen ĉiu homo sukcesas lerni vortojn por tiuj nocioj, pri kiuj la koncerna homo okupiĝadas. Se en la Inuita lingvo ekzistas abundo da diversaj vortoj por indiki diversajn specojn de neĝo, tio okazis, ĉar por la Inuito gravis fari tiujn distingojn. Ankaŭ en Esperanto ni devus havi la eblecon precize esprimi nin, kio ne signifas, ke ni devus enkonduki pro tio multegajn novajn radikojn. Kelkaj radikoj por specialaj neĝoj kiel "firno", "hajlo", "grajlo" jam ekzistas. Aliajn neĝo- aŭ glacio-specojn ni povus priskribi, kio ne ĝenos je malofte uzotaj nocioj. Sed gravas, ke ni kapablos esprimi nin kaj precize kaj ambigue, se ni deziras tion. Se ni povus pruvi, ke Esperanto superas laŭkvalite iun ajn el la etnaj lingvoj, ni pli facile povus instigi homojn lerni ĝin.

Antaŭ jardeko ne ekzistis la ebleco kunlaborigi multajn homojn por racie pliriĉigi nian lingvon. Nur beletristoj aŭ sciencistoj, kies verkoj estis publikigitaj, povis kontribui ion al la evoluo de nia lingvo. La invento de komputoroj radikale ŝanĝis tiun situation. Tamen Esperantistoj ĝenerale ankoraŭ ne profunde pensis pri tiuj novaj eblecoj. Probable multaj ne sentas sin sufiĉe kompetentaj por proponi novajn terminojn. Tamen, ili povus komence almenaŭ kunlabori je la registrado de

mult-lingvaj elektronikaj terminaroj. Tio ĉi estas la alia decida avantaĝo de Esperanto en la lingvo-konkuro: Sur nia terĝlobo ekzistas laŭ mia konvinko en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj Esperantistoj, kiuj senpage pretus labori sur la terminara kampo, se ili sciis, ke ili per tiu ĉi laboro grave kontribuos al la venko de nia lingvo, kaj se ili povus sperti kiom plezurige estas partopreni en tiu ĉi laboro. Taskoj abundas por la plej diversaj talentoj. Ĉiu, kiu kunlaboras, baldaŭ konstato la fruktojn de sia laboro: Ĉiu preparas por si mem propran terminaron, kiu kunfandiĝos kun aliaj sammaniere aranĝitaj terminaroj. Tial, ĉar multaj laboras paralele en aliaj fakoj, ĉiu disponos baldaŭ pri ampleksa terminaro. Tiel Esperantistoj povus per komuna laboro en mallonga tempo kompili la bezonatajn multlingvajn terminarojn.

La unua paŝo jam realiĝis

La trivoluma, 1816-paĝa "Plena Pekoteko 1985-1990" montras konkrete, kiel elektronika kompilado de valoraj terminaroj estas realigebla. Ju pli da Esperantistoj en la plej diversaj fakoj kaj landoj kunlaboros, des pli impresaj fariĝos la rezultoj. Ne plu necesas verki kompletajn fak-terminarojn. Ni registru ĉiun unuopan terminon, kies mankon iu konstato, kaj ni petu proponojn de Esperantistoj kun diversaj gepatraj lingvoj, kiel plej trafe esprimi la nocion de la etnolingva termino. Mi estas konvinkita, ke ofte ni povos krei pli trafajn esprimojn en Esperanto ol etnolingve, ĉar ni pli libere povas fari tion pro tio, ke ni ne estas malhelpataj per etnolingvaj kutimoj.

Pekoteko (akronimo formita el Per-komputoro termino-kolekto) baziĝis sur spertoj de mia iama "Slipara Vortaro". Kiel tiu termino-kolektado okazas en Pekoteko mi montras per kelkaj ekzemplaj novaj registraĵoj, kiuj baziĝas sur problemoj, pri kiuj atentigis d-ro Bormann en sia artikolo:

Ne necesas aŭtoritate decidi, ĉu ni en Esperanto uzu la terminon "kontenero" aŭ "kestego". En la Suplemento al PIV estas klare difinita, ke "kontenero" estas speciala normigita tipo de transportujo. "Kestego" kontraŭe estas laŭ la konsistigaj elementoj de la vorto iu ajn granda kesto. Do "kestego" indikas pli ĝeneralan nocion. Ĉiu "kontenero" povas servi kiel "kestego", sed ne inverse. Ambaŭ terminoj utilas.

"Komputilo" laŭ termino-elementoj devas esti "ilo faciliganta komputadon". Depende de la difino, kiun ni atribuas al "komputi", komputilo povas indiki tre malsimilajn objektojn. Tial la pli preciza termino "komputoro" ŝajnas al mi preferinda, se oni alcelas la aparaton por aŭtomata data-traktado. Tial "komputilo" kaj "komputoro" same kiel "kestego kaj "kontenero" estas utilaj terminoj en nia lingvo. Necesas nur publikigi tion. Faras neniun sencon sen kono de la bazaj nocioj daŭrigi la diskuton pri tiuj ĉi terminoj. Tamen, se iu ne konsentas, tiu rajtas prezenti sian opinion en la Pekoteko-kadro. Tial neniu devas timi, ke per Pekoteko estos rekomendataj terminoj, kiujn la plimulto ne pretas akcepti.

Ĉu "lizingo" aŭ "sistem-luo"?

D-ro Bormann menciis la neologismon "lizingo", por kiu li en sia prelego proponis la terminon "sistem-luo". Tio-ĉi instigis min en-Pekotekigi ambaŭ terminojn, por montri kiel mi rekomendas trakti tiuspecajn problemojn pere de Pekoteko. Je ĉiu problemo ni unue registras la difinon de la nocio, por kiu ni serĉas terminon. Antaŭ tiu difino aperas en Pekoteko-registraĵo la al la nocio atribuitaj etnolingvaj terminoj en la alfabeto sinsekvo de iliaj lingvo-mallongigoj (escepte de {eo1}, kiu troviĝas komence).

Ĉiam ni indikas post la terminoj per referenciloj la fontojn (la verko, el kiu la termino estis ĉerpita, aŭ la aŭtoro, kiu proponis ĝin). Pere de la font-indika kampo (post Fon:) ni ekscias, ke en la suba registraĵo la terminon {eo1} proponis Ian Jackson, ĉar la referencilo *a referencas al la persono, kiu en Bulteno de Esperanta Jura Asocio, 1992/1, sur paĝo 5 enkondukis la terminon "lu-financo" kaj kiu difinis ĝin samloke. *b post {eo2} kaj {eo3} referencas al <KomT>, tio signifas, ke la terminoj aperis en la Proveldono de Komerca Terminaro, de Hans Wiersch, eldonita de IKEF en 1989. Pere de la referenciloj ni krome ekscias, ke *a taksis tiun terminon evitinda. Tiun opinion subtenis mi, ĉar *c referencas al ei. La terminoj {eo4}, {eo5} aŭ {eo6} ŝajnas esti preferindaj, kion mi klopodis pravigi en Rlm: (la rimarkigo-kampo). Krome mi indikis pere de font-indikoj, ke oni akceptis en la Germana la Anglan terminon, kaj ke oni malrekomendis ĝin en la Franca. Tiujn aldonojn mi faris verkante tiun ĉi artikolon, ĉar la datoj inter duoblaj pintaj krampoj je la fino de la nocio-kompleksoj indikas, kiam la lastaj ŝanĝoj en iu nocio-komplekso estis faritaj. Vi vidas, ke la registraĵoj provizas amason da informoj, utilaj por diskuti la taŭgecon de difinoj kaj terminoj. Ŝanĝojn kaj korektojn en la registraĵoj rajtas fari nur la registrintoj aŭ la aŭtoroj, sed ili povas anonci tiujn ŝanĝojn iam ajn. Tiel la elektronikaj registraĵoj estas ĉiam ĝisdataj.

{U1} 381.748.3
{T1} HEJ
{eo1} lu-financ/o *a
{eo2} lizing**/o *b EVIT *a*c
{eo3} sistem-lu/o *b EVIT *c
{eo4} lu-financ/ad/o *c
{eo5} lis''/ad/o <1> *c
{eo6} liz/ad/o <1> *c
{de1} Leasing *b*ĉ
{en1} leasing *a*b
{fr1} leasing *b EVIT *d
{fr2} crédit-bail *d

Financa operacio por faciligi akiron de ekipaĵo. Anstataŭ aĉeti la ekipaĵon, la entreprenisto petas, ke tion faru lia banko. La entreprenisto poste lu-prenas ĝin de la banko kontraŭ periodopagoj ekvivalentaj al kapitala amortizo plus interezoj. La ekonomia rezulto do similas al deprunto de la aĉetoprezio, sed ofte ekzistas imposta avantaĝo en la lu-metodo. *a

Fon: *a Ian Jackson en Bulteno de Esperanta Jura Asocio, 1992/1,p5; *b KomT; *c ei; *ĉ DUD-U; *d PetLar91;

93/130

Rlm: La angla vorto *leasing* signifas simple "luado" kaj oni uzas ĝin ankaŭ por priskribi la luadon de terpecoj. Nur la kunteksto indikas, ĉu oni uzas la vorton laŭ ĝia terojura aŭ financa signifo. Ĝi estas gerundio derivita de la verbo *to lease*, kiu signifas kaj "lu-doni" kaj "lu-preni". {eo2} agacas pro du kaŭzoj: 1-e, ĉar ĝia radikilo havas substantivan karakteron malgraŭ tio, ke ĝi priskribas agon. Pro la sama kialo maltaŭgis la vorto "dumpingo"; ĝin oni prave nun anstataŭigas per dumpado (87/697).

2-e, ĉar entute ne necesas neologismi. Anglalingvanoj ne sentas bezonon de aparta radikilo por tiu ĉi financa operacio. Ili kontentas uzi ordinaran vorton por luado. Kial ni ne same? Aliflanke, ili pretas fidi al la kunteksto por eviti konfuzon, dum ni preferas maksimuman klaron. Sed tia klaro estas facile atingebla per kunuzo de radikiloj "lu" kaj "financ". *a

ei (93-04-03): "financo" laŭ PIV estas "monaj rimedoj, pri kiuj iu disponas", tial mi preferas preni kiel bazon la verbon (-93/131), kaj derivi de ĝi la terminon {eo4}. {eo3} laŭ mi estas maltrafa termino, ĉar pensigas pri tio, ke iu sistemo (kio ĝi estas? - Kial ne objekto?) estas lu-prenata aŭ ludonata. {eo2} ankaŭ al mi ne plaĉas, sed ĉar la Angla termino fariĝis internacie faka esprimo por lu-financado,oble estus utile atribui duan komercan signifon al la radikiloj "lis" <PIVS> aŭ "liz" <PIV> kaj derivi de iliaj verboj la terminojn {eo5} aŭ {eo6} por tiu ĉi nocio-komplekso.

-93/131, 132, 133. Mi petas reagojn. *c
«93-07-22»

{U1} 381.748.3
{T1} HEJ
{eo1} lu-financ/l (ion) *a
{eo2} lis''/l <1> (ion) *b
{eo3} liz/l <1> (ion) *b
{de1} leasen *c
{en1} lease finance (for something)
♦ to provide *a

Fari kontrakton kun iu por provizi financajn rimedojn per lu-dono aŭ lu-preno de ter-peco aŭ objekto. *b

Fon: *a Ian Jackson en Bulteno de Esperanta Jura Asocio, 1992/1,p5; *b ei; *c DUD-U;

93/131

Rlm: «93-07-03»

{U1} 381.748.3
{T1} HEJ
{eo1} financ/e lu-don/l (ion al iu) *a
{eo2} lis''-don/l (ion al iu) *b
{eo3} liz-don/l (ion al iu) *b
{eo4} lu-vend/l (ion al iu) *b
{de1} leasen *c
{en1} lease (something to someone) ♦ to *a

Fari kontrakton kun iu, kiu deziras per luado iom post iom aĉeti objekton. Por tiu servo la lu-vendisto postulas de la lu-aĉetinto periodajn pagojn, kiuj egalas al la kapitala amortizo plus interezo. *b

Fon: *a Ian Jackson en Bulteno de Esperanta Jura Asocio, 1992/1,p5; *b ei; *c DUD-U;

93/132

Rim: ei (93-04-03): -93/130, 131. La adverbo en {eo1} laŭ mi ne faras senco, ĉar kutime oni enspezas monon per lu-donado aŭ oni elspezas monon por lu-preni ion. Tial lu-donado ĉiam estas financa afero.

«93-07-22»

{U1} 381.748.3
 {T1} HEJ
 {eo1} **financ/e lu-pren/i** (ion de iu) *a
 {eo2} **ils''-pren/i** (ion de iu) *b
 {eo3} **ilz-pren/i** (ion de iu) *b
 {eo4} **lu-aĉet/i** (ion de lu) *b
 {de1} **leasen** *c
 {en1} **lease** (something from someone) ♦
 to *a

Fari kontrakton kun iu (plejofte banko), kiu provizas la financajn rimedojn por aĉeti objekton, kiun deziras per luado aĉeti la lu-aĉetinto. La lu-aĉetinto devigas sin pagi al la lu-vendisto periodajn pagojn, kiuj egalas al la kapitala amortizo plus interezo. *b

Fon: *a Ian Jackson en Bulteno de Esperanta Jura Asocio, 1992/1,p5; *b ei; *c DUD-U;

93/133

Rim: ei (93-04-03): -Mian rimarkigon en 93/132.

«93-07-22»

La sekvanta termino komplekso traktas nocion por kiu s-ro Pettyn petis trafan terminon, ĉar li bezonas ĝin por la elsendoj de la Pola Radio. La de li proponita termino estas {eo2}. Mi, post esploro de la nocio-komplekso, proponis terminojn {eo1} aŭ {eo3}. Mi petas, ke ekonomiaj fakuloj, donu siajn konsilojn kaj pri terminoj kaj difinoj de tiu ĉi komplekso. Per publika diskuto ni probable povos atingi pli bonajn rekomendojn.

{U1} 347.72
 {U2} 658.114
 {T1} FHB
 {eo1} **Inter'nacl/a risk-hav/a**
entrepren/o *a
 {eo2} **Inter'nacl-miks/lt/a kompani/o** *c
 {eo3} **komunventur**/o** *a
 {de1} **Joint-venture** n *b
 {de2} **Gemeinschaftsunternehmen** n *b
 {en1} **joint venture** *b
 {fr1} **joint venture** *ĉ
 {fr2} **entreprise** mixte *ĉ

Asociiĝo inter fizikaj aŭ juraj personoj por komuna limigita celo kun divido de kostoj kaj riskoj. *a laŭ *ĉ

Komerca kompanio fondita de enlanda firmao kune kun firmao eksterlanda aŭ de eksterlandaj firmaoj sur la tereno de la koncerna lando por gvidi ekonomian agadon. *c

Fon: *a ei; *b DUD-U; *c pet; *ĉ PetLar91;

93/146

Rim: ei (93-06-09): Bedaŭrinde mi ne kapablis trovi fidindan difinon por {en1}. *Venture* signifas "risiko", kaj etimologie rilatas al "aventuro". Tial kreo de nova radiko (el "komuna aventuro") ŝajnas al mi akceptebla solvo. Laŭ mia impresio ne temas pri daŭre ekzistanta kompanio, sed pri dumtempa asociiĝo de diversaj entreprenoj por realigi iun riskan projekton. La tiu-cele bezonata kapitalo estas Angle *venture capital* (= por-riska kapitalo). «93-06-09»

Mia tezo estas, ke per tiuspeca komuna laboro ni povus rapide evoluigi nian lingvon, se pli da Esperantistoj kunlaborus laŭ la sama skemo, ĉar tiel ni povus distribui la taskojn al multaj homoj. Laŭ d-ro Bormann mankas je nia laboro "kunordiga efiko". Tiun efikon generas laŭ mi apliko de la Pekoteko-procedo, kiu devigas ĉiun kunlaboranton apliki la saman registro-manieron, defendi la proprajn proponojn aŭ akcepti kaj esprimi aprobon por aliaj proponoj.

Por doni detalajn informojn pri la Pekoteko-procedo mi registris sur du kasedoj (US\$6.00) 11 prelegetojn, kiujn oni povus aŭdigi dum kunvenoj de lokaj grupoj por stimuli diskuton pri la prezentitaj problemoj. La teksto aperis ankaŭ en 44-paĝa broŝuro (US\$4.00).

La presitaj volumoj de "Plena Pekoteko 1985-1990" (PP85-90) estas relative multekostaj pro la amplekso de la verko: kune kun la du respondiloj preskqaŭ 2000 paĝoj (US\$80.00 + \$9.60 + \$6.60 por sendkostoj de du pakajoj). La verkon ricevis donace ĉiuj kolegoj en la Akademio. Mi esperas, ke PP85-90 estos utila al ili kaj ke la aldonita enketo kun 720 demandoj instigos ilin al seriozaj respondoj, por ke ni havu fidindan bazon pro prijuĝi, kion ne nur niaj kolegoj en la Akademio sed ankaŭ unuopaj Esperantistoj opinias pri tiuj problemoj, pri kiuj ankoraŭ ne unueca lingvo-uzo ekzistas. La elektronikaj registraĵoj de la tuta verko estas haveblaj

- a) sur kvin 3,5-colaj moldiskoj (1,44 megabajtoj),
- b) sur dek 3,5-colaj moldiskoj (720 kilobajtoj),
- c) sur dudek 5,25-colaj moldiskoj (kun 360 kb) en DOS- aŭ Mekintoŝ-versioj. Ili kostas la duonon de la presita eldono: kun sendkostoj US\$45.00.

Kunlaborantoj, kiuj registris tekstojn, rajtas elekti, kiujn registraĵojn ili senkoste ricevu interŝange.

NDLR — Jen kio montras, ke la tiel dezirata teknika terminaro bone progresas: ĉar teknikajn terminojn uzas teknikistoj, estas bone, ke tiuj ĉi kontribuu por la kompilado; tamen por eviti kontraŭ-Fundamentajn formojn, estas bone, ke la kompiladon gvidu la Direktoro de la Akademio Sekcio pri fakaj vortaroj.

SKRIBAS LEGANTOJ . . .

"Ĉu la Akademio iam decidus rekomendi, kiam uzi aŭ ne uzi majusklojn?

Miaopinie la plej oportuna kaj facila regulo estus uzi majusklojn por substantivoj, kiuj estas propraj nomoj, kaj por titoloj, kaj minusklojn por la aliaj koncernaj vortoj. Do, "Esperanto" kaj "esperantisto" (kiel en Antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto), Francio, franco kaj franca lingvo, Nederlando, nederlandano kaj nederlanda lingvo.

Edward Ockey (Granda Britio)

NDLR – La propono havas la meriton evitigi superfluan de majuskloj kaj sekve pli reliefigi la proprajn nomojn . . . Sed eblas havi alian opinionon, nome, ke pli simplas, se la majusklo restas ankaŭ por la derivaĵoj ("Franco, Francio, Franca lingvo"), des pli ke la tria estas ankaŭ propra nomo, tute komparebla al "Esperanto", kiun ĉiu skribas kun majusklo.

*

Por kvietigi la disputadon kaŭzitan de la du Akademie rekomenditaj land-nomoj : 1) La Kabea Egipto (anstataŭ la Zamenhofa Egiptujo) kaj 2) la tradicia Koreo (kiu malplaĉas al Koreanoj, oni povas uzi "la lando Egipta" (kiun Zamenhof uzis ekz-e en "Eliro" 29, 7 : 3) kaj la lando "Korea".

Edward Ockey (G.B.)

NDLR – Bonintenca propono inda je gesamideanoj, sed . . . ! Sed redakcioj abunde uzis tian sistemon por eviti la uzon de sufikso aŭ alia, sed ilin oni riproĉis!

*

Leginte en via periodaĵo la Demandojn faritajn dum la publika kunsido de Akademianoj (Vieno, 1992), mi ekhavis la impreson, ke granda konfuzo ĉirkaŭas la trian demandon : la indikita signifo (kontraŭsenca veturanto) aplikigas al Nl. spookrijder kaj al G. Geistesfahrer sed ja ne al F. nègre kaj al A. ghost-writer. Ŝajnas, ke la konfuzo fontas el la similo de ĉi-lasta kun la samsignifa A. ghostrider. Kion vi opinias?

Antonio Martins (Lisboa, Portugalio)

NDLR – Nur la demanda teksto povis efektive aspekti konfuza; sed la respondo tute klare distingis : "subverkisto" por ghostwriter aŭ nègre, kaj simple "ŝoforaĉo" por Geisterfahrer kaj spookrijder (Letero n-ro 21).

*

(En la Letero n-ro 23) mi legas la vortojn de D-ro Albault : . . . se la internacia lingvo estas arta kaj "arte-fara" . . . Li do ne diras "artefarita", kiel oni uzas kutime. Mi jam antaŭ longe pensis pri tio, ke la esprimo "artefarita lingvo" ne estas ĝusta. Kaj en la Suplemento de PIV mi legas sub la kapvorto "artefarita" pri reno kaj koro. Sed en la posta kapvorto oni diras : artefakto. Objekto produktita de la krea aŭ inventa kapablo de homo . . . Ĉu oni povas do diri, ke "artefarita" kaj "artefakta" estas nun sinonimoj? En miaj Ĉeĥaj libroj mi trovas klarigojn pri la vorto "artefakt". Unu diras la samon, kiel SPIV, sed aldonas : Prahistoria ilo el ŝtono aŭ osto. La dua libro kaj la tria diras nur la samon, kiel SPIV. La kvara (el la jaroj 1935-37) estas iom speciala : Arta verko estas "artefakt", ĝi devas alidesegni realon kaj modifi ĝin je realo nova. La Germana Duden (1939) : Kunsterzeugnis. Bezeichnung vorgeschichtlicher Werkzeuge. Do nur la klarigoj en la unua kaj la lasta libroj mencias praagecon de la objek-

toj, sed nur kiel kroman signifon de la vorto. Ĉu ne estus do pli konvene diri "artefakta lingvo"?

Adolf Stañura (Haviřov, CR)

NDLR – Ŝajnas esti nek "konvene" nek "bonvene" diri "atefakta" anstataŭ "artefarita", ĉar la vorto "artefakto" de Angla deveno estas specife teknika termino uzebla en tre apartaj kazoj, kiel ekzemple en medicina radiografio, kiam sur la filmo videbliĝas makuloj kaj/aŭ streketoj ŝulditaj nur al la aparato. – Cetero "artefara" malsamas de "artefarita": la unua faras, la duan oni faris!

*

Ĉu estas bonstile kaj korekte laŭplaĉe verbigi kiun ajn radikon, dum la verba formo de radiko ne kuŝas en la vortaro? Ekz-e:

La socion motoras ekonomiaj fortoj. (Mi preferus: gvidas).

Krom klavi brave, li kantas klare. (Mi preferus: klavtuŝi).

La 46-an sesion de IKU rektoros profesorino X... (Kial ne: Profesorino X estos rektorino de la 46-a?)

Li multe artikolas pri Esp-o. (Mi preferas: verkas artikolojn).

La feliĉo proportias al la eblecoj. (Ĉu estas propocia al ne pli bonas?)

Fine jen kio nerveksitas min: la verbo bali uzita de altranguloj! Ni kafo-paŭzis, balis. Ni balis ĝis satigo. Ĉu "bali" signifas: ĉeesti balon, danci en balo? Estas konfuze!

J. Ducrocq (Calais, Francio)

NDLR – Verbigo de kiu ajn vorto estas kutima karakterizaĵo de la Angla lingvo, sed ankaŭ (kaj kial ne?) de la Esperanta kun la senco: manifestiĝi per, t.e. jen agi per (marteli), jen agi aŭ stati kiel (tajlori), aŭ agi -a (avari)... Ekzemploj troviĝas jam ĉe Zamenhof, Grabowski, Privat, k.a. (PAG \$299).

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. – Redaktoro: Jean THIERRY. – Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX. – Presejo: COCONNIER, 72300 SABLÉ. – C.P.P.: n-ro 6971. – Prezo: 1 n-ro: 40 FRE – Jara abono: 120 FRE – Pagebla: ĉe kontoj: Banka: Crédit Lyonnais n-ro 7090 E – Poŝtĉeka: 735 27 B Paris. – UEA: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto". Paralele avertu ĉe la adreso de "La Amikoj de l' Akademio".

Perantoj por diversaj landoj:

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta): S-ro UMEDA Yosimi, I.R.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Benelukso: Eldonejo kaj Librejo SONORILO. Doornstraat 22, B 2610 WILRIJK, Belgio. PCK 000-0152140-44. – Kreditkartoj EUROCARD, MASTERCARD aŭ VISA, JCB cards aŭ AMERICAN EXPRESS: sciigu numeron, valido-periodon kaj la nomon de la kreditkarto. Ne forgesu subskribi! Jarabono: 881 BEF (Telefono + telefakso: +32 3 827 24 05. – tage kaj nokte + aŭtomata respondilo).

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo: SeS Ed Jockey Club – Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio: S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D 33100 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301.

Kubo: S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko: S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

Svedio: Sveda Esperanta Federacio: c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono: Eldonejo Bero: P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono.